


CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 122**

N-RO 22 (90), NOVEMBRO 2021

Enhavo

Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn

«Jen miaj infanoj» 3

«Same kiel baleno kribras planktonon tra l'dentojn» 3

Klara Ilutoviĉ

Festo 4

Ni renkontiĝos! 4

Datrevenoj de la rusa kulturo

Nikolaj Nekrasov. 200-jariĝo 5

Nikolaj Nekrasov

Vanjka, “Antaŭ teruroj de milit”, “Ĉefurboj, oratoroj bruas”,

“Versaĵoj miaj! Atestantoj ploraj”, Fragmento el poemo

“Kamparaj infanoj” Elegio. Tradukoj de *V. Melnikov,*

A. Mitin, K. Ilutoviĉ, N. Neĉaev, T. Auderskaja 6

Originala prozo

La Olda Konkistadoro. Junulino el Ĉiĉen Ica 16

Tradukita prozo

Aleksej Nikolaeviĉ Tolstoj. La rusa karaktero Trad. *G. Ŝlepĉenko* 19

Prozo de esperantistoj

Eŭgenij Ĥaritonov. Alrondoo kaj la magia vulpo 28

Korekto al la rezultoj de la Belartaj Konkursoj – potencialaj partoprenantoj, atentu! 30

Por distro kaj amuzo

Krucvortemigmo. Respondoj 31

Anonco 31

Humuro

Amuzaj notoj el la gastlibro de Ermitejo. Trad. *A. Sidorov* 32

Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn



Jen miaj infanoj –
pinetoj, kiujn mi plantis
en la diafanaj
matenoj. Kaj pasis kvin jaroj.
L'odoro kaj ĉarmo,
pri kiuj mi iam kantis,
denove kun varmo
ekfluas en miaj arbaroj.
Ne gravas do, kiom
da jaroj donos l' destino –
ja iom post iom
la pinoj kreskos eĉ sen mi,
kaj do post jardekoj,
eble, mia nepino
l'arbaron revenos
por ĝui kaj novajn semi.
13.10.2021

Same kiel baleno kribras planktonon tra l'dentojn,
plonĝe en la memoro mi la erojn valorajn kribras.
La kribrado revekas ĉiujn dormintajn tentojn,
kaj en mia vivo-rutino mi jam ne plu ekvilibras.

En la kapo eventoj iamaj vagajn pensojn ŝancelas,
vagaj ventoj de la juneco tie blovas penetre.
Ja kun tiuj ventoj nepre flugus mi foren, se la
tergravit' mian pezon al la hejmo premadus ne tre.

En la tago kvieta, kiun kaŝas la horizonto dume,
mi l'graviton konkeros, la flugilojn eksvingos vantajn,
kaj amikoj-aminjoj miaj, ĉe la fajro sidantaj ume,
per okuloj sekvos la fajrerojn, min adiaŭantajn.
29.10.2021





Festoj

Tag' de komputilo, de torto,
Tag' de katoj, kisoj, kotletoj...
Renaskiĝu feste plu forto
Por vivige bolaj impetoj!

Kaj inspire Tag' de muziko
Kantu novan ardan vivgloron,
Kaj bonguste Tag' de ŝaŝliko
Plezurigu buŝon kaj koron!

Tag' de sano, de ĉokolado –
Ne angoru hom', ne acido!
Tago eĉ de nenifarado –
Hom' ridetu, ridu kaj ridu!

Kio stumblojn-falojn kompensas
Dum vivbato re- kaj refoja?
Oni novajn festojn elpensas –
Ĉu por fari l' vivon pli ĝoja?

Ajnaj festoj – etaj, tutlandaj –
Vivamige ĝojon donacas.
Ĉiuj festoj estas, do, grandaj,
Ĉiu siabilde sagacas.

Plenbrakumu gajaj tempestoj,
Deflankiĝu teda kutimo!
Homo havu multe da festoj,
Multe festu lia animo!


Ni renkontiĝos!

Vere multe da temp', vere longe la mondo
Al la virus' sin dediĉis,
Kaj esperantistar' en la viva klubrondo
Ne renkontiĝis.

La fifama kronul' ne rapidas foriri,
La pandemio plu kriĉas.
Do, ĝis kiam al ni pri l' kunvenoj sopiri?
Ni renkontiĝas.

Kaj aspiras ni plu malgraŭ l' prem' esti kune,
Elektronik' ne sufiĉos.
Ke kuraĝu la viv' pli fervore, pli june,
Ni renkontiĝos!

Datrevenoj de la rusa kulturo



Nikolaj Nekrasov 200 jaroj post la naskiĝo

Nikolaj Alekseviĉ Nekrasov (28.11 — 27.12.1877) estas kutime konsiderata poeto, kiu okupas la trian lokon en la rusa poezio de la 19-a jc. (post A. Puŝkin kaj M. Lermontov). Estis poetoj en lia epoko ne malpli lertaj, ne malpli poeziecaj, kun ne malpli forta envolviĝo en la sociajn problemojn, sed Nekrasov sukcesis kunfandi ĉiujn flankojn de la poezio, kaj fariĝis tre konata kaj ŝatata en ĉiuj tavoloj de la popolo. Certaj versoj fariĝis tekstoj de popularaj kantoj, kiuj estas kantataj eĉ ĝis nun, pluraj

esprimoj eniris la rusan kulturon kiel proverboj. Liaj poemoj kaj epopeoj priskribas la vivon de la rusaj kamparanoj kun granda kono de ĝi kaj konsento la malfacilaj kondiĉoj, en kiuj ili ekzistas kaj laboras. Li vaste uzis la ĉiutagan popolan lingvaĵon en sia poezio, kio estis sufiĉe nova por lia tempo kaj de iuj estis traktata kiel profanigo de la arto, sed reale pliriĉigis la poezian lingvon. Li verkis ankaŭ prozon kaj teatraĵojn, sed ili preskaŭ ne influis la literaturon, kaj plejparte estas forgesitaj.

Ne malpli ol kiel poeto, li lasis la spuron en la historio de la rusa ĵurnalistiko. En 1840-aj–1860-aj li gvidis la plej gravan rusan literaturan revuon “Sovremennik” (“Samtempulo”), kiu allogis la plej talentajn kaj progresemajn verkistojn. La revuo aperigis verkojn kun arda kritiko de la socia ordo malgraŭ cenzuraj obstakloj (kompreneble, ne ĉio sukcesis aperi, sed multo) kaj samtempe ĉiam restis finance sukcesa. Post tamena fermo fare de la cenzuro de la revuo, li daŭrigis sian agadon en alia revuo “Oteĉestvennije zapiski” (“Patrolandaj notoj”), kiu same fariĝis nesto de la plej bonaj progresemaj verkistoj. Li aperigis krome popularan satiran suplementon al “Sovremennik” kun la nomo “Svistok” (“Fajfilo”). Sen tiuj revuoj literatura vivo de Rusio de tiu epoko ne imageblas.

Laŭ siaj sociaj vidpunktoj li estis radikala revolucia liberalulo, adepto de kapitalisma evoluo de Rusio laŭ la usona modelo. Samtempe li estis granda kontraŭulo de tiu formo de kapitalismo (“prusa modelo”), kiu ekevoluis en Rusio post abolo de la servutisma sistemo. Li ĉiam estis proksima al la rusaj socialistoj (Belinskij, Ĉerniŝevskij, Dobrolubov ka.), kaj fariĝis standardo de la establiganta movado de popolemuloj (*narodniki*).

Samtempe lia personeco ne evitis kontraŭdirojn, kaj li, kiel nobelo, ŝatis la komfortan nobelan vivon kaj amuzojn, kiel kartludo, ĉasado ks., kaj ne evitis certajn moralajn kompromisojn en sia agado, kiam li penis eviti persekutojn kaj savi sian revuon.

Нравственный человек

1

Живя согласно с строгою моралью,
Я никому не сделал в жизни зла.
Жена моя, закрыв лицо вуалью,
Под вечерок к любовнику пошла.
Я в дом к нему с полицией прокрался
И уличил... Он вызвал — я не дрался!
Она слегла в постель и умерла,
Истерзана позором и печалью...
Живя согласно с строгою моралью,
Я никому не сделал в жизни зла.

2

Приятель в срок мне долга не
представил.
Я, намекнув по-дружески ему,
Закону рассудить нас предоставил;
Закон приговорил его в тюрьму.
В ней умер он, не заплатив алтына,
Но я не злюсь, хоть злиться есть
причина!
Я долг ему простил того ж числа,
Почтив его слезами и печалью...
Живя согласно с строгою моралью,
Я никому не сделал в жизни зла.

3

Крестьянина я отдал в повара,
Он удался; хороший повар — счастье!
Но часто отлучался со двора
И званию неприличное пристрастьё
Имел: любил читать и рассуждать.
Я, утомясь грозить и распекать,
Отчески посекал его, каналью;
Он взял да утопился: дурь нашла!
Живя согласно с строгою моралью,
Я никому не сделал в жизни зла.

4

Имел я дочь; в учителя влюбилась
И с ним бежать хотела сгоряча.
Я погрозил проклятьем ей: смирилась
И вышла за сядого богача.
Их дом блестящ и полон был как чаша;
Но стала вдруг бледнеть и гаснуть
Маша
И через год в чахотке умерла,
Сразив весь дом глубокою печалью...
Живя согласно с строгою моралью,
Я никому не сделал в жизни зла...

1847

Morala homo

1

Mi vivas laŭ reguloj kaj moralo
Neniam faris ion de malbon'.
Kaŝinte la vizaĝon sub vualo,
Edzin' foriris al amor-fripon'.
Mi kun polico spuris — kaj akuzis!
Defiis li dueli — mi rifuzis.
Ŝi kuŝis kaj forpasis post sezono',
Rongita per malgloro kaj honteco.
Mi vivas laŭ moral' kaj pia deco,
Neniam faris ion de malbon'.

2

Amiko ŝuldon malfruiĝis pagi.
Mi, milde aludinte pri redono',
Decidis kun juĝistoj interagi,
Juĝistoj lin kondamnis al prizon'.
Li mortis, ne paginte eĉ moneron.
Sed en la kor' ne tenas mi koleron,
Mi tuj forgesis pri ĉi tiu mono',
Funebris lin kun larmoj kaj tristeco...
Mi vivas laŭ moral' kaj pia deco,
Neniam faris ion de malbon'.

3

Jen mia servutulo, kamparan'.
Mi sendis lin por studi kuiradon.
Sukcesis li! Mi ĝuis ĉiun pladon.
Sed havis li inklinon ne por rango' —
Tre ŝatis ion legi kaj rezoni.
Mi lacis lin persvadi kaj admoni,
Kaj foje patre batis per bastono'.
Li poste sin dronigis pro stulteco.
Mi vivas laŭ moral' kaj pia deco,
Neniam faris ion de malbon'.

4

Filino volis fuĝi kun studento.
Mi ŝin minacis per infera brulo',
Do ŝi rezignaciis kun prudento
Kaj iĝis la edzin' de grizharulo'
Tre riĉa. L' domo plenis je trezoro!
Sed Manĝo eksuferis en angoro
Kaj mortis jaron post la nupta krono',
Pro ftizo pala, griza pro tristeco...
Mi vivas laŭ moral' kaj pia deco,
Neniam faris ion de malbon'...

Trad. Aleksandro Miin

Ванька

Смешная сцена! Ванька – дуралей,
Чтоб седока промыслить побогаче,
Украдкой чистит бляхи на своей
Ободранной и заморенной кляче.
Не так ли ты, продажная краса,
Себе придать желая блеск
фальшивый,
Старательно взбиваешь волоса
На голове, давно полуплешивой?
Но оба вы – извозчик – дуралей
И ты, смешно причесанная дама, -
Вы пробуждаете не смех в душе
моей -
Мерещится мне всюду драма.
1850

Забывтая деревня

1
У бурмистра Власа бабушка Ненила
Починить избёнку лесу попросила.
Отвечал: нет лесу, и не жди — не
будет!
«Вот приедет барин — барин нас
рассудит,
Барин сам увидит, что плоха
избушка,
И велит дать лесу», — думает
старушка.

2
Кто-то по соседству, лихоимец
жадный,
У крестьян землицы косячок
изрядный
Оттягал, отрезал плутовским
манером.
«Вот приедет барин: будет
землемерам! —
Думают крестьяне. — Скажет барин
слово —
И землюцу нашу отдадут нам снова».

3
Полюбил Наташу хлебопашец
вольный,
Да перечит девке немец
сердобольный,
Главный управитель. «Погодим,

Vanjka*

Ridinda sceno! Stulta fiakrist',
por plaĉi al la pasaĝer' bonstata,
purigas jungo-ŝildojn kun persist'
sur ĉevalaĉo magra, tormentata.
Ĉu same vi, ho aĉetebla bel',
al falsa bril' strebante, inter haroj
kirlumas diligente, laŭ model',
sur kapo, duonkalva jam de jaroj?
sed ambaŭ vi — stultulo la koĉer',
kaj vi, kombita plej ridinde damo, —
ne ridon vekas enanime — sed, en ver',
por mi videblas ĉie dramo.
1850

Trad. Valentin Melnikov

*Vanjka (Ivaĉjo) estas kutima tiutempa
voknomo por fiakristoj de plej malalta klaso.

Forgesita vilaĝo

1
Olda Neonila petis ekonomon
Doni arbotrunkojn fliki sian domon.
Li respondis: “Mankas! Vi ne
ĝisatendos”.
“La sinjoro venos, l' moŝto min
defendos,
Vidos kadukecon — kaj plenĉar' da
ligno
Estos donacata”, — pensas oldulino.

2
Iu el najbaroj, majstro de aferoj,
Alproprigis grandan parton de la tero
Disde l' kamparanoj per fripona tajlo.
“La sinjoro venos — timu do, kanaljo!” —
Kamparanoj pensas. — “La senjor'
patronos,
Kaj ŝtelitan teron oni nin redonos”.

3.
Amis belan Nanjon kamparano ŝtata,
Tamen malkonsentas vokto malbenata.
Nanjo diras: “Iĉjo, dume ni atendos,
La sinjoro venos — ni pri ĉio plendos”.
Juna aŭ maljuna, kiam mankas vero,

Игнаша,
Вот приедет барин!» — говорит
Наташа.
Малые, большие — дело чуть за
спором —
«Вот приедет барин!» — повторяют
хором...

4
Умерла Ненила; на чужой земле
У соседа-плута — урожай сторицей;
Прежние парнишки ходят бородаты;
Хлебопашец вольный угодил в
солдаты,
И сама Наташа свадьбой уж не
бредит...
Барина всё нету... барин всё не едет!

5
Наконец однажды среди дороги
Шестернею цугом показались дроги:
На дорогах высоких гроб стоит
дубовый,
А в гробу-то барин; а за гробом —
новый.
Старого отпели, новый слезы вытер,
Сел в свою карету — и уехал в
Пигер.
1855

Внимая ужасам войны,
При каждой новой жертве боя
Мне жаль не друга, не жены,
Мне жаль не самого героя...
Увы! утешится жена,
И друга лучший друг забудет;
Но где-то есть душа одна -
Она до гроба помнить будет!
Средь лицемерных наших дел
И всякой пошлости и прозы
Одни я в мир подсмотрел
Святые, искренние слезы -
То слезы бедных матерей!
Им не забыть своих детей,
Погибших на кровавой ниве,
Как не поднять плакучей иве
Своих поникнувших ветвей...

1855-56

“La sinjoro venos” — gurdas kun
espero.

4.
Mortis Neonila. Sur ŝtelita grundo
Ĉe l' trompisto — spikoj kreskas en
abundo;
Eks-junuloj barbas. L' kamparano ŝtata
Estis forsendita por la viv' soldata.
Nanjo pri la nupto jam ne plu deliras...
La sinjoro mankas... La sinjor' ne iras!

5
Foje kamparanoj spektis la defilon —
Vigla ĉevalseso tenis veturilon.
Sur la veturilo staris ĉerk' el kverko,
Ene — la sinjoro! L' nova — post la
ĉerko.
Post funebro l' filo l' patron finsuspiris,
Sidis en la ĉaron — kaj sen vort'
foriris.

Trad. Aleksandro Miĥin

Antaŭ teruroj de milit'
Ĉe ĉiu ĝia novviktimo
Ne kompatigas sen hezيت'
Li mem, amik', edzinanimo...
Konsolon trovos, ve, edzin',
Amik' forgesos la amikon,
Sed unu koro ĝis la fin'
Memoros sian vivtragikon!
Dum nia viv' en hipokrit',
En vulgareco de vivprozo
Mi vidis larmojn sen imit',
Sincerajn, sanktajn, sen plorpozo —
Patrinajn larmojn de l' dolor'.
Ne forgesblas la memor'
Pri l' fil' tra l' sangokampaj bruloj,
Kiel ne levas plorbetuloj
La branĉojn, kiam sinkas for.

Trad. Klara Ilutoviĉ

Не знаю, как созданы люди другие,
—
Мне любви и дороги блага земные.
Я милую землю, я солнце люблю,
Желаю, надеюсь, страстями киплю.
И жаден мой слух, и мой глаз
любопытен,
И весь я в желаньях моих ненасытен.
Зачем (же) я вечно тоскую и плачу
И сердце на горе бесплодное трачу?
Зачем не иду по дороге большой
За благами жизни, за пестрой
толпой?
1855 или 1856

Ne scias mi eston de homoj ceteraj, —
por mi pleje karas la bonoj surteraj.
Mi amas la teron, la sunon laŭ vol',
deziras, esperas, pasias ĝis bol'.
Avidas l' orel', scivolemas okulo,
kaj mi en deziroj malsatas, ardulo.
Do kial mi ĉiam sopiras en ploro,
por vana malĝoj' disipiĝas la koro?
Mi kial ne iras laŭ larĝa vojev'
por bonoj de l' vivo, en bunta
homgreg'?

Trad. Valentin Melnikov

В столицах шум,
гремят витии,
Кипит словесная война,
А там, во глубине
России,-
Там вековая тишина.
Лишь ветер не дает
покою
Вершинам
придорожных ив,
И выгибаются дугою,
Целуясь с матерью
землею,
Колосья бесконечных
нив...
1857-58

En urboj bru', bruegas
homoj,
Bolegas kria malkonsent.
En ruo apud florumoj,
Ekzistas amo kaj silent'.
Nur vento pacon ne
permesas
Al vert' salika ĉe ŝose',
Nur kampa vento plu
agresas,
Nur klini kampa vent' ne
ĉesas
Nun spikojn flavajn de
horde'.

Trad. Nikolao Neĉaev

Ĉefurboj, oratoroj bruas,
Agrese bolas vortmilit',
Sed fore en Rusio fluas
Silent' jarcenta de l'
ermit'.
Nur vent' ne lasas la
obstinon,
Kaj spikoj fleksas arke l'
sinon,
Kisante teron la patrinon,
En la senlima kampa
mar'.

Trad. Klara Ilutoviĉ

Стихи мои! Свидетели живые
За мир пролитых слез!
Родитесь вы в минуты роковые
Душевных гроз
И бьетесь о сердца людские,
Как волны об утес.
1858

Versaĵoj miaj! Atestantoj ploraj
Pri larmoj de l' epok'!
Naskiĝas fulmotondre vi en horoj
De l' animvok',
Batante kontraŭ homaj koroj
Je ondoj kontraŭ rok'.

Trad. Klara Ilutoviĉ

**Отрывок из поэмы
«Крестьянские дети»**

... Однажды, в студёную зимнюю пору,
Я из лесу вышел; был сильный мороз.
Гляжу, поднимается медленно в гору
Лошадка, везущая хворосту воз.
И, шествуя важно, в спокойствии чинном.
Лошадку ведёт под уздцы мужичок
В больших сапогах, в полушубке овчинном,
В больших рукавицах... а сам с ноготок!
— Здорово, парнище! — «Ступай себе мимо!»
— Уж больно ты грозен, как я погляжу!
Откуда дровишки? — «Из лесу, вестимо;
Отец, слышишь, рубит, а я отвожу». (В лесу раздавался топор дровосека.)
— А что, у отца-то большая семья?
—
«Семья-то большая, да два человека
Всего мужиков-то: отец мой да я...»
— Так вон оно что! А как звать тебя?
—
«Власом».
— А кой тебе годик? — «Шестой миновал...
Ну, мёртвая!» — крикнул малюточка басом.
Рванул под уздцы и быстрее зашагал...
1861

**Fragmento el poemo
“Kamparaj infanoj”**

Jen foje, dum vintra malvarma vetero
Mi iris promene tra densa arbar’
Kaj vidas, ke tiras ĉevalo mizera
Ĉaregon, ŝarĝitan de seka branĉar’.

Elpaŝas solide, trankvila kaj grava,
Tenante la bridojn, bizara kampul’:
En botoj grandegaj, ŝafpelto, vid’
brava,

La gantoj enormaj, sed mem ja etul’!

—“Saluton, knabego!” — “Pluiru kun Dio!”

—“Severa vi estas!” — (mi kun ironi’).

—“De kie lignaj’?” — “El arbar’

gubernia:

La patro hakadas, forportas do mi”.

(Proksime la son’ de hakilo aŭdiĝas).

—“Ĉu granda rezidas en hejm’ famili’?”

—“Jes, granda, sed nure du viroj troviĝas

En la patrodomo: la patro kaj mi”

—“Do jene! Kaj kiel vin nomi?” — “Mi -- Vlaso”

—“Kaj kiom vi aĝas?” — “Ĵus pasis sesjar’...

Nu, pigra!” -- ekkriis etulo per baso,

La bridojn ektiris – kaj for el arbar’.

Trad. Tatjana Auderskaja



Что думает старуха, когда ей не спится

В позднюю ночь над усталой деревнею
Сон непробудный царит,
Только старуху столетнюю, древнюю
Не посетил он.— Не спит,

Мечется по печи, охает, мается,
Ждет — не поют петухи!
Вся-то ей долгая жизнь
представляется,
Всё-то грехи да грехи!

«Охти мне! часто владыку небесного
Я искушала грехом:
Нутко-се! с ходу-то, с ходу-то крестного
Раз я ушла с пареньком

В рошу... Вот то-то! мы смолоду
дурочки,
Думаем: милостив Бог!
Раз у соседки взяла из-под курочки
Пару яичек... ох! ох!

В страдную пору больной
притворилась —
Мужа в побывку ждала...
С Федей-солдатиком чуть не
слюбилась...
С мужем под праздник спала.

Охти мне... ох! угрожу в преисподнюю!
Раз, как забрили сына,
Я возроптала на благость господнюю,
В пост испила молока,—

То-то я грешница! то-то
преступница!
С горя валялась пьяна...
Божия мать! Святая заступница!
Вся-то грешна я, грешна!..»
1862—1863

Kion pensas maljunulino, kiam ŝi ne povas dormi

Dum meza nokt' en aero vilaĝa
Ŝvebas beato kaj dorm'
Nur unu maljunulin' centjaraĝa
Sur la kuŝejo ĉe l' forn'

Dormi ne povas — moviĝas, suferas,
Oĥas ĝis kokerikad'.
L' tuta vivaĉ' en memoro aperas —
Peko post pek', en invad'!

“Aĥ, pe
kulin'! Certe, damnos min Dio,
Punos Ĉiela Sinjor'!
Oĥ-ho! Ĉu eblas? De krucprocesio
Fuĝis kun knabo mi for

En arbareton... Jen do! Kien venis!
Pensis, pardonos Li nin...
Foje (ho Di'!) mi du ovojn forprenis
De sub najbara kokin';

Dum rikoltado simulis malsanon...
Oĥ, kia do malhonest'!
Preskaŭ amoris soldaton Stepanon...
Kuŝis kun edzo dum fest'...

Jen kio! Nepre mi trafos inferon!
Foje — aĥ, kia malĉast'! —
Vekis denove mi Dian koleron —
Laktan trinketis dum fast'.

Kia do honto! Oĥ, kia malbono!
Falis mi iam post vin'...
Dia Patrino! Sankta Madono!
Mi pekulin', pekulin'...”

Trad. Aleksandro Miĥin

Зелёный Шум

(Так народ называет пробуждение природы весной. Прим. Н. Некрасова)

Идёт-гудёт Зелёный Шум,
Зелёный Шум, весенний шум!

Играючи, расходится
Вдруг ветер верховой:
Качнёт кусты ольховые,
Подымет пыль цветочную,
Как облако, — всё зелено,
И воздух, и вода!

Идёт-гудёт Зелёный Шум,
Зелёный Шум, весенний шум!

Скромна моя хозяйшка
Наталья Патрикеевна,
Водой не замутит!
Да с ней беда случилася,
Как лето жил я в Питере...
Сама сказала, глупая,
Типун ей на язык!

В избе сам-друг с обманщицей
Зима нас заперла,
В мои глаза суровые
Глядит, — молчит жена.
Молчу... а дума лютая
Покоя не дает:
Убить... так жаль сердечную!
Стерпеть — так силы нет!
А тут зима косматая
Ревёт и день и ночь:
«Убей, убей изменницу!
Злодея изведи!
Не то весь век промаешься,
Ни днем, ни долгой ноченькой
Покоя не найдешь.
В глаза твои бесстыжие
Соседи наплюют!..»
Под песню-вьюгу зимнюю
Окрепла дума лютая —
Припас я вострый нож...
Да вдруг весна подкралася...

La verda bruo

(Verda bruo – tiel la popolo nomas printempan vekigon de la naturo. Noto de N. Nekrasov)

Jen iras-spiras verda bru',
Verdega bru', printempa bru'.

Petole plifortiĝas vent'
El supravolga land':
Ĝi tuŝas branĉojn de alnar',
Polenon floran levas sor,
Kvazaŭ nebulo... Verdas nun:
Kaj akvo, kaj aer'.

Jen iras-spiras verda bru',
Verdega bru', printempa bru'.

Modesta estas mia sort'
Natalja Patrikejevna,
Ne vundos muŝon eĉ.
Sed jen — okazis malfeliĉ'
Dum loĝis mi en Peterburg'...
Ŝi mem rakontis, stultulin',
Sekiĝu ŝia lang'!

En domo ŝlosis vintra frid'
Min kun la trompulin'.
Okulojn miajn la edzin'
Rigardas en silent'.
Silentas mi... Sed peza pens'
Obsedas min sen ĉes'.
Ĉu murdi? Kompatindas ŝi!
Toleri — mankas fort'...
Sed bruas, muĝas vila vintra'
Kaj tage, kaj dum nokt':
“Perfidulinon murdu vi!
Diablon ĵetu for!
Alie lasos vin trunkvil' –
En tago, en obskura nokt'
Ĉe vi forestos pac'!
Najbaroj malestimos vin,
Fingrumos kun mokem'!”
Sub tiu vintra kant' -blizard'
Fortiĝis la severa pens' —
Tranĉilon prenis mi...
Printempo venis sen atend'...

Идет-гудёт Зелёный Шум,
Зелёный Шум, весенний шум!

Как молоком облитые,
Стоят сады вишнёвые,
Тихохонько шумят;
Пригреты тёплым солнышком,
Шумят повеселелые
Сосновые леса;
А рядом новой зеленью
Лепечут песню новую
И липа бледнолистая,
И белая берёзонька
С зелёною косой!
Шумит тростинка малая,
Шумит высокий клён...
Шумят они по-новому,
По-новому, весеннему...

Идёт-гудёт Зелёный Шум,
Зелёный Шум, весенний шум!

Слабеет дума лютая,
Нож валится из рук,
И всё мне песня слышится
Одна — в лесу, в лугу:
«Люби, покуда любитя,
Терпи, покуда терпится,
Прощай, пока прощается,
И — Бог тебе судья!»

Начало 1863 года

Элегия

А. Н. Е[рако]ву

Пускай нам говорит изменчивая
мода,
Что тема старая "страдания
народа"
И что поэзия забыть ее должна.
Не верьте, юноши! не ста'реет
она.
О, если бы ее могли состарить
годы!
Процвел бы божий мир!... Увы!
пока народы

Jen iras-spiras verda bru',
Verdega bru', printempa bru'.

Kaj, kvazaŭ frondojn kovris lakt',
En blanko staras ĉerizej',
Flustretas en trankvil'.
Kaj, varmigitaĵ sub la sun',
Bruadas kun printempa ĝoj'
Pinaroj ĉe vilaĝ'.
Per sia nova foliar'
Balbutas novajn kantojn kaj
Foliopala arb'-tili',
Kaj svelta blanka betulet'
Kun verda harplektaĵ'.
Bruadas kaj malgranda ŝalm',
Kaj alta arb'-acer'...
Bruadas ili kun la ĝoj',
La nova ĝoj', printempa ĝoj'.

Jen iras-spiras verda bru',
Verdega bru', printempa bru'.

Febliĝas la severa pens',
Kaj falas la tranĉil',
Kaj ĉie sonas unu kant' —
En kampo, en arbar':
"Dum ami eblas, amu vi,
Toleri, do pardonu vi
Pardonu, do pardonu vi
Kaj — Dio juĝu vin".

Trad. Aleksandro Miĉin

Elegio

Kaprica modo al ni diras kun leĝero,
Ke tro malnovas temo — "de popol'
sufero",
Kaj ke forgesi tion devas poezi'.
Ne kredu, junaj! Ja ne malnoviĝas
ĝi.
Se jaroj povus ĝin oldigi laŭ
bonvolo!
Prosperus dia mond'!.. Sed ve, dum
la popolo
Treniĝas en mizer', al vip' obee nur,

Влачатся в нищете, покорствуя
бичам,
Как тощие стада по скошенным
лугам,
Оплакивать их рок, служить им
будет муза, И в мире нет прочней,
прекраснее союза!...
Толпе напоминать, что бедствует
народ,
В то время, как она ликует и поет,
К народу возбуждать вниманье
сильных мира –
Чему достойнее служить могла бы
лира?...
Я лиру посвятил народу своему.
Быть может, я умру неведомый
ему,
Но я ему служил – и сердцем я
спокоен...
Пускай наносит вред врагу не
каждый воин,
Но каждый в бой иди! А бой
решит судьба...
Я видел красный день: в России
нет раба!
И слезы сладкие я пролил в
умиленье...
"Довольно ликовать в наивном
увлеченье, –
Шепнула Муза мне. – Пора идти
вперед:
Народ освобожден, но счастлив ли
народ?..
Внимаю ль песни жниц над
жатвой золотой,
Старик ли медленный шагает за
сохою,
Бежит ли по лугу, играя и свистя,
С отцовским завтраком довольное
дитя,
Сверкают ли серпы, звенят ли
дружно косы –
Ответа я ищу на тайные вопросы,
Кипящие в уме: "В последние года
Сносней ли стала ты,
крестьянская страда?
И рабству долговому пришедшая на
смену
Свобода наконец внесла ли

Samkiel magraj brutoj sur falĉita
rur',
Priploros Muzo l' sorton, servos al
libero,
Ne eblas unuiĝ' pli firma sur la
tero!..
Dum festas hom-amaso kun jubil'
kaj kant',
Rememorigo pri popolo-suferant',
De l' potenculoj al popol' atent-
altiro —
Ĉu eblas ja destin' pli inda por la
liro?..
Dediĉis liron mi al la popola bon'.
Kaj eĉ se mortos mi lasita, sen
rekon',
Mi servis ĝin — do sentas kor'
trankvil-efikon...
Ne ĉiu militant' damaĝas
malamikon,
Sed — iru al batal'! Kaj sort'
decidos tuj...
Mi vidis tagon: ne plu sklavo en
Rusuj'!
Mi verŝis dolĉajn larmojn en raviĝo
kora...
"Sufiĉas jubiladi en naiv' adora, —
Alflustris Muzo min. — Pluiru, jen
kondiĉ':
Liberas la popol', sed kio pri
feliĉ'?!..
Ĉu aŭdas kantojn mi dum rikoltado
grena,
Aŭ vidas maljunulon en plugado
pena,
Ĉu gaja knabo kun ludemo kaj
fajfad'
Al patro portas manĝon laŭ herbeja
pad',
Ĉu brilas kaj sonoras falĉilar' rapida
—
Mi serĉas la respondon al demand'
insida,
Bolanta en la mens': "Ĉu dum
pasinta jar'
Pli tolereblas jam laboro sur
kampar'?
Kaj pro libero nuna, post sklavec'

перемену В народные судьбы? в
напевы сельских дев?
Иль так же горестен нестройный
их напев?.."

Уж вечер настает. Волнуемый
мечтами,
По нивам, по лугам, уставленным
стогами,
Задумчиво брожу в прохладной
полутьме,
И песнь сама собой слагается в
уме, Недавних, тайных дум живое
воплощенье:
На сельские труды зову
благословенье,
Народному врагу проклятия сулю,
А другу у небес могущества
молю,
И песнь моя громка!.. Ей вторят
долы, нивы,
И эхо дальних гор ей шлет свои
отзывы,
И лес откликнулся... Природа
внемлет мне,
Но тот, о ком пою в вечерней
тишине,
Кому посвящены мечтания поэта,
Увы! не внемлет он – и не дает
ответа...

1874

Сон

Мне снилось: на утесе стоя,
Я в море броситься хотел,
Вдруг ангел света и покоя
Мне песню чудную запел:
«Дождись весны! Приду я рано,
Скажу: будь снова человек!
Сниму с главы покров тумана
И сон с отяжелелых век;
И музе возвращу я голос,
И вновь блаженные часы
Ты обретешь, собирая колос
С своей несжатой полосы».
1877

jarcenta,
Ĉu fine venis ŝanĝo klara, evidenta
Al sorto de popol'? Al kantoj en
vilaĝ'?
Aŭ sonas tie plu malĝojo kaj
domaĝ'?..”

Vespero venas jam. De l' revoj
obsedite,
Tra kampoj kaj herbejoj vagas mi
medite,
Preteras fojnostakojn en krepuska
dens',
Kaj kanto per si mem formiĝas en la
mens',
Esprim' de meditado ĵusa en
sekreto:
Por kamp-labor' mi vokas benon en
kvieto,
Por malamik' — insulton sendas en
kruel',
Kaj por amik' — plenpovon petas de
l' ĉiel',
Kaj laŭtas mia kant'!.. Tra kampoj
ĝi resonas,
Kaj eĥo de montaro la ripetojn
donas,
Replikis la arbar'... Naturo — en
atent',
Sed mia prikantato en vesper-silent',
Al kiu la poetaj revoj apartenas,
Ne aŭdas min, ho ve! — kaj la
respond' ne venas...

Trad. Valentin Melnikov

Sonĝo

Mi sonĝis: mi, sur klif' starante,
En maron ĵeti volis min,
Anĝel' de lum' kaj pac' ekkante
Min ravis per la kantfascino.
“Mi venu en printempa lumo
Kun vort: reiĝu hom' – vi mem!
Senigu l' kaon mi je fumo,
L' palpebrojn pezajn je dormem',
Al vers' redonu la muzikon,
Kaj ree en beatriver'”
Vi fartos, rikoltonte spikon
De via nefalĉita ter'”

Trad. Klara Ilutoviĉ

Junulino el Ĉiĉen Ica

La olda konkistadoro

La patro malkontentas. Li revenadas hejmen deprimita; kaj se li estas malĝoja, do ploru mi kaj la fratinoj. Li diras: “Sekeco, malpluvas”. Li estas impostkolektisto, sed kamparanoj ĉi-jare ne havas per kio pagi impostojn: ĉio forsekiĝis.

Mi ja mem vidas: nia rivero tiel malprofundiĝis, ke por pleniĝi la kruĉon, oni devas stari klinite ĝis kiam la gamboj ekdoloros; sed antaŭe la rivero mem plenigadis ĝin en palpebruma daŭro...

Li diras: “Maizo ne sprosis, vilaĝanoj ne havas kion manĝi; kaj ankaŭ ni baldaŭ ne havos. Sed se mi ne kolektos la impostojn, pereos ne nur vilaĝanoj, pereos la ŝtato mem, ĉio ruiniĝos kaj ŝakaloj kuros laŭ la malplenaj stratoj”.

Mi timas ŝakalojn, kaj mi ne volas morti pro malsato. Mi estas nur 15-jara, kaj mi volas vivi. Mi ja tiom multe ne vidis ankoraŭ en la vivo!

La rivero nun preskaŭ tute sekiĝis; de la kampoj blovas varmega vento plena de polvo. Ĝi bruligas, malklarigas okulojn, skrapas vizaĝon... La patrino jam ne balaas en la domo: la polvo troviĝas ĉie, kaj ni senfortas batali kontraŭ ĝi, ĉar ĝi aperas denove kaj denove. Ni manĝas preskaŭ sekan maizon kun polvo. Necesas pluvo...

Hodiaŭ la patro revenis aparte maltrankvila; li forpelis nin fratinojn el la domo, longe preparolis ion kun la panjo, kriis... Ŝi foriris postplora kaj longe observis nin, speciale min. Ĉu oni decidis edzinigi min? Do kial plori – mi ja ekhavos novan vivon, kaj eble, en la domo de la edzo troviĝos pli multe da akvo kaj manĝo? Kaj la gepatroj liberiĝos de unu manĝanto: ja da ni, fratinoj, estas sesopo!

Mortis Ica, la plej juna fratino. Ŝi magriĝis, nigriĝis kaj poiomete velkis. Ŝi konstante petis trinki; sed ne ekzistas loko, kie ni prenas akvon. Eĉ la plej profundaj putoj sekiĝis. Nun de tie oni prenas nur ŝlimon kaj koton. Se tiaĵon rapide alporti hejmen kaj elpremi tra ĉifonon, rezultiĝos iom da fetora bruna akvo; sed alia akvo forestas.

La urbo senhomiĝis: multaj mortas, la plimulto simple ne havas fortojn por foriri el hejmo. La patro jam kelkajn tagojn ne plu veturas al vilaĝoj; li diris, ke tie, en kamparo, jam neniu restis. Tie forestas lokoj por ŝirmi onin de la suno, kaj la kampoj jam tute kovriĝis per polvo. Nun la patro vizitas la kunsidojn de la Konsilio, sed pri tio, kion ili diskutas tie, rakontas nenion. La patrino apenaŭ moviĝas, kaj tre dankas min, ke mi, kiel la plej aĝa, helpas en la mastrumado,

eliras por porti akvon... Sed varmegas, kaj dum oni alportas hejmen peceton da ŝlimo, ĝi ofte sekiĝas...

Hodiaŭ la patro revenis frue kaj tuj vokis min. Mi komprenis, ke li volas diri ion gravan kaj ekĝojis: fin-fine edziniĝen, al nova vivo! Sed li diris: "Filinjo, vi ricevos la plej ravan edzon, diecan edzon. Vi estas elektita fianĉino de Viclipucli- Huiclipoçtli, la dio de la pluvo! Milnombraj junulinoj envios vin, kiam vi, vestita brile, ornamita per juveloj, enpaŝos lian regnon! Feliĉu, ĉar vi estas elektita por savi nian popolon!"

Mi stuporis. Do jen kiun edzon oni antaŭdestinas al mi! Jes, solene paradi en pompaj vestaĵoj antaŭ la tuta popolo, por ke ĉiuj aplaŭdu min, min adoru, min kultu... Kaj fariĝi fianĉino de grandioza dio, kiu tiel facile povas sendi la morton al la tuta nia popolo; savi la popolon kaj mem fariĝi egala al dioj...

Sed por kio tio al mi? Mi ne deziras splendajn vestojn kaj riĉaĵon; mi neniam revis pri juveloj kaj pri gloro! Mi ŝatas sunon kaj venton, riveron kaj salikojn apud ĝi. Mi volas vivi sur la tero, sed ne sub la tero aŭ surĉiele.

Se Viclipucli mortigas homojn, mi ne volas esti lia edzino!

Ja ne la unuan fojon venas al ni senpluveco, ne la unuan fojon oni kolektas junulinojn por oferi ilin al li – kaj kio? Ĉu li satiĝis? Ĉu li ĉesis mortigi?

Por li ja tio ne gravas: li daŭre voras junulinojn, mortigas homojn kaj ĝenerale ne atentis iliajn agojn! Kiomfoje post oferado ne okazis pluvo! La patro rakontis, ke foje pluvas ĵus antaŭ la planita ceremonio; tiam la riton oni rapide abolas, kaj la elektitaj junulinoj revenas al siaj familioj. Sed ilin neniu edzinigas, ĉar la dio mem ne volis akcepti ilin; kiu do bezonus ilin ĉi tie? Ili kadukiĝas kaj mortas en soleco, oni forpelas ilin el hejmoj kaj neniu manĝigas ilin. Kaj se ne pluvis longe post la rito, nenio okazis. La pastroj ne hontis, ke ili eraris. Ili senĝene daŭrigis plu preskribi la ritojn kaj elekti oferojn... Ĉu la Distingindajn? Ne, oferojn, kaj mi ne volas esti ofero!

Sed kiu demandos junulinon, ĉu ŝi volas aŭ ne volas esti la Distinginda, fianĉino, ofero? Ŝia afero estas obei kaj ĝoji pro ĉio, kion oni preskribos al ŝi sur la vivovojo. Ŝi ne estas homo, ŝi estas ŝanĝmonero, per kiu oni pagas ... al kiu? Al dio, kiu estigas malbonon? Aŭ al sia propra timo antaŭ tiu dio, antaŭ ĉiuj dioj, nevideblaj kaj nekompreneblaj, kiuj regas en tiu nekomprenebla al ni mondo?

La pastroj okazigas ritojn, kiuj influas nenion; sed neniu rimarkas tion, ĉiuj senpense kredas al pastroj, ĉar la mondo estas grandega kaj nekonata. Sed necesas ja ajna orientilo, iu ajn apogilo, io kion eblas kredi! Nu jen, ekzemple, kredi, ke la mortigo de junulinoj utilos al la sorto de la popolo... Sed al kiuj utilos la vivoj de tiuj junulinoj? Ili neniom valoras. Tamen, espereble, Viclipucli ekkompatos la popolon...

Nur la pastroj estas senkompataj. Estas ili, kiuj elektas fianĉinojn por la dio; sed de kie ili scias, kiun deziras tiu dio? Ĉu vere li deziras ĝuste min, kiu tiel malamas lin, semanton de malbono? Mi ne havas eblon saviĝi, sed mi rezistos ĝisfine. Mi ne cedos humile al la morto.

Nenio povis nuligi la proklamitan ceremonion: ja ne ekpluvis intertempe. En la indikita tago la solena procesio sin direktis al la Granda Senoto.

La belaj knabinoj, filinoj de elitaj familioj, plej indaj de la urbo, kronitaj per diademoj, kovritaj per oro kaj juveloj brilantaj sur iliaj vestaĵoj sub radioj de senkompata suno, estis renkontitaj de aplaŭdegoj de l' popolo, revivigita de l' espero. Sur la vizaĝoj de junulinoj vidiĝis la sama ekzaltiĝo: ili ja estas elektitaj por savo de la popolo; ilia memofero alportos vivon al sekiĝintaj kampoj, al mortantaj familioj. Kaj kiel belege estas stari tiel, majeste vestitaj, sub ravaj rigardoj kaj jubilaj krioj de l' amaso! Por tio ne indus domaĝi sian vivon. Kion vidis tiuj knabinoj en siaj hejmoj? Muelŝtonojn por maizo kaj pedikojn? Kaj jen venis la plej glora tago de ilia vivo!

La procesio alproksimiĝis al la Senoto, kaj la pastroj komencis ĵetadi po unu la brilantajn juninojn al la faŭko de la puto. La krioj de la knabinoj kunsonis kun jubilaj krioj de l' homamaso. Sed subite unu el junulinoj rapide elturniĝis el la vico, ĉirkaŭbrakumis la plej proksiman al ŝi pastron kaj kune kun li sin ĵetis al faŭkanta abismo.

La ceremonio daŭris. Nenio rajtas rompi la grandan riton de l' komunikiĝo kun la dio.

Kaj la sekvan tagon ekpluvis.

Notoj

1. La ĉefa fonto: "Götter, Gräber und Gelehrte", C. W. Ceram [pron. Keram]

2. "Inter multnombraj kranioj de junulinoj, suprenigitaj el la Sankta Senoto, estis trovita unusola kranio de maljuna viro". C. W. Ceram.

3. La nomo de la pluvdio de majaoj estas ne *Viclipuclī–Huicipočtli*, sed *Ĉuck*. Sed tio sonas tro prozece, kaj krome, koincidas kun la nomo de fama esperantisto ☺. Sed ni ne bezonas tiajn tiklaĵojn!:-)


4. *Viclipuclī–Huicipočtli* estas la militdio de aztekoj.

5. Kaj ŝakaloj ne loĝas en Mezameriko; sed kiu besto, konata al vasta publiko, samtempe abomena kaj minaca, povus celdirekte influi la mensojn de legantoj?

6. En la majaaĵ vortoj ni ŝanĝis la hispanan vortkombinon "tz", kion oni kutime renkontas ankaŭ en esperantlingvaj tekstoj, al fonetika esperanta "c" (la red.).



Tradukita prozo



Aleksej Nikolaeviĉ Tolstoj (1883 — 1945) estas rusa kaj sovetia verkisto, poeto, scenaristo, socia aganto. Li naskiĝis la 10-an de januaro 1883 en urbo Nikolaevsk (post 1918 jaro — Pugaĉov) en Samara gubernio (Rusio). Li naskiĝis el nobela familio kaj eĉ havis grafan titolon. Cetere, li devenas de la sama antaŭulo kiel famaj verkistoj Lev Nikolajeviĉ kaj Aleksej Konstantinoviĉ, tamen ilia parenceco estis tre

malproksima. Liaj infanaĝaj jaroj pasis en bieneto Sosnovka apud urbo Samara. Post kiam li sukcese finis kursojn de liceo en urbo Sizrjanj, li forveturis en Sankt-Peterburgo-n, kie lernis en Teknologia instituto. Liaj unuaj publikaĵoj aperis en 1907 — rakontoj "Malnova turo", "Liriko", "Fabeloj de pigo". Dum la 1-a monda milito li estis milita korespondanto. Al la bolŝevista revolucio li rilatis negative, kaj en 1918 — 1923 jaroj post la elmigro vivis komence en Parizo, kaj poste en Berlino. En tiu periodo aperis liaj famaj verkoj "Aelita", "Infanaĝo de Nikita", "Aventuroj tra suferoj (unua parto)". Post kiam li revenis en la patrolandon, li politikiĝis en la spirito de la reganta partio kaj daŭrigis verkadon. Aperis liaj verkoj "Aventuroj de Nevzorov, aŭ Ibikus" (1924), "Hiperboloido de inĝeniero Garin" (1927), "Sperta homo" (1927), "Vipero" (1928). En 1930-1944 jaroj Aleksej Nikolaeviĉ multe verkis laŭ mendo de sovetia registaro, ŝanĝante la rilaton al siaj herojoj kaj historiaj eventoj laŭ politika konjunkturo: ekzemple, la figuro de la caro Petro la 1-a, komence aperas kiel kruela tirano, sed en la 3-voluma epopeo pri li (1930-1944) li kun liaj agoj fariĝis progresemulo preskaŭ amanto de la popolo. Ekzemple, estis publikigita novelo "Pano", kie li notis gravan rolon de Stalin en la Intercivitana milito, ankaŭ negrandaj verkaĵoj "Ivan Groznij" (1944) kaj "Rusa karaktero" (1944). Pro tio li estis elektita kiel deputito de la Supera Soveto de USSR, kaj ano de la Akademio de Sciencoj, ricevis multajn ŝtatajn premiojn kaj oficialajn dankojn. Pro tio li ricevis moknomon "ruĝa grafo". Lia tre fama verko tiutempe estis porinfana fabelo "Ora ŝlosileto" (1935). Ĝenerale, li havis tre grandan verkistan talenton kaj laboremon, liaj verkoj legiĝas kun granda intereso, tamen lia idea senprincipeco ofte elvokis ĉe liaj kolegoj-samtempuloj negativajn emociojn. Li mortis en Moskvo pro kancero en februaro 1945.

La rusa karaktero.

Rusa karaktero! Por eta rakonto la nomo estas tro signifoplena. Sed kion fari, nome pri ĝi mi volas paroli kun vi, pri la rusa karaktero.

La rusa karaktero! Provu priskribi ĝin... Ĉu rakonti pri heroaĵoj? Sed tiuj estas tiom multaj, ke mi eĉ ne scias, kiun priskribi. Jen helpis al mi unu mia kunulo per eta okazaĵo el lia privata vivo. Kiel li militis kontraŭ la germanoj, mi ne rakontos, kvankam li portas surbruste Oran Steleton¹ kun multe da aliaj diversaj ordenoj. Li estas ordinara modesta persono, kolhozano el apudvolga vilaĝo de Saratova provinco. Sed inter homoj li distingiĝas per sia forta bela staturato. Se rigardi, kiel li lerte eliĝas el tureto de tanko, — dio de milito! Jen li detankiĝas surteren, demetas kaskon de sur sia kapo, kovrita de humidaj bukaj haroj, viŝas per ĉifonaĵo sian malpuran vizaĝon, kaj nepre ridetas pro anima ŝato.

Dum la milito, ĉiam troviĝante apud morto, la homoj iĝas pli bonaj, ĉiu bagatelaĵo detavoliĝas for de ili, kiel malsana haŭto post suna brulvundo, kaj restas en la homo nur la kerno. Certe, unu persono havas la pli fortikan kernon, alia — pli feblan. Tamen tiu, kiu havas la kernon kun difekto, strebas perfektigi, ĉar ĉiu volas esti bona kaj fidela kamarado. Sed mia amiko, Jegor Drjomov, ankaŭ antaŭ la milito sobre kondutis, tre estimis kaj amis sian patrinon, Marja Polikarpovna, kaj sian patron, Jegor Jegoroviĉ. “Mia patro estas homo solida. Li antaŭĉio estimas sin mem. Vi, — li diras —, mia filo, vidos multon en la mondo, ankaŭ vizitos fremdlandojn, sed ĉiam fieru, ke vi estas la rusoj...”

Li havis fianĉinon el la sama vilaĝo apud Volgo. Pri fianĉinoj kaj edzinoj oni multe rakontas, precipe kiam en la fronto kvietas, frostas, en ŝirmejo fulgas fajreto, brulas eta stovo, kaj homoj jam vespermanĝis. Tiutempe estas aŭdataj tiaj historietoj, ke vole-nevole la oreloj rifuzas aŭskulti. Ekzemple, oni subite demandas: “Kio estas amo?” Unu homo diras: “La amo aperas surbaze de estimo...”, sed la alia: “Tute ne. La amo estas kutimo, ĉar homo amas ne nur la edzinon, sed ankaŭ gepatrojn, eĉ bestojn...”. “Ha, kia vi estas stultulo! — diras la tria persono — la amo estas situacio, kiam en vi bolas sentoj, kaj homo paŝas kiel ebrulo...”. La filozofiado daŭras unu horon, eĉ pli, ĝis kiam ĉefserĝento, kiu subite miksas sin en la disputon, per ordona tono difinas la esencon de la problemo. Jegor Drjomov, verŝajne ĝeniĝis pro la disputo, kaj nur iomete informis min pri sia fianĉino, kiu estas tre bona junulino, kaj se ŝi diris, ke atendas, ŝi nepre renkontos lin, eĉ se li revenos sen unu gambo...

Pri siaj militaj heroaĵoj li ankaŭ ne ŝatis babiladi: “Pri la aferoj mi ne volas rememori!”. Li nur kuntiras la brovojn, kaj fumas. Pri militaj aventuroj de lia tanko ni eksciis nur dank’ al vortoj de la personaro. Precipe mirigis aŭskultantojn tankmaŝinisto Ĉuvilev.

“...Nu, jen ni returnis nian tankon, kaj ekvidis kiel el post monteto elrampas... Mi krias: “Kamarado leŭtenanto, tanko Tigro!” “Antaŭen — li krias — akcelu!...” Mi tuj komencis maski sin en picearo, moviĝante jen dekstre, jen live. La Tigro movas tubon kiel blindulo, kaj ekpafis maltrafe... Sed kamarado leŭtenanto jen ekpafis al ĝi, — nur splitoj de obuso! Li denove ekpafis al tureto de la tanko, kaj tiu klinis la tubon supren... Post tria pafado el ĉiuj fendoj de la Tigro

¹ Ora Stelo – medalo de la Heroo de Sovetunio, la plej alta distingo pro heroaĵoj en USSR.

eliĝis fumo, kaj poste aperis flamo je cent metroj alta... Tankistoj komencis forlasi la Tigron tra savelira lukso... Ivano Lapšin per mitralo komencis pafi tiujn. Surtere kuŝas ili, nur la piedoj konvulsas... Por ni vojo estas libera. Post kvin minutoj ni rapide atingas vilaĝon. En tiu momento mi apenaŭ ne krevis de rido... Faŝistoj kaptitaj de paniko diskuras... Pro koto multaj germanoj perdis botojn, kaj kuras en ŝtrumpetoj. Ĉiuj krias kaj direktas sin al kabano. La kamarado leŭtenanto ordonas: "Direktu la tankon al la kabano". La tubeton kun kanono ni turnis malantaŭen, kaj nia tanko grandrapide penetris en la kabanon... Dio mia! Kontraŭ tanka blendo brue batadis traboj, brikoj, faŝistoj, kiuj sidis sub tegmento... Mi ankaŭ per raŭpoĵoj de la tanko disprenis restaĵojn. Kiuj restis vivaj, tuj kapitulaciis."

Tiel militis leŭtenanto Jegor Drjomov ĝis kiam okazis al li malfeliĉo. Dum Kurska batalo unu obuso trafis en la tankon. Du tankistoj tuj estis mortigitaj. Post trafo de dua obuso la tanko ekbrulis. Tankmaŝinisto Cuvilev, kiu elgrimpiis tra la antaŭa lukso, denove surgrimpiis la tankon, kaj eltiris la leŭtenanton. Jegor Drjomov estis senkonscia, lia vesto brulis. Kiam Ĉuvilev fortiris la leŭtenanton, la tanko tuj eksplodis tiel forte, ke tureto de la tanko estis forĵetita je kvindek metroj. Ĉuvilev per la manoj surŝutis lozan teron sur la kapon, vizaĝon, kaj veston de la leŭtenanto por estingi fajron. Poste ili rampis de unu eksploda funelo al la alia por atingi pansejon... "Kial mi kuntrenis lin? — rakontis Ĉuvilev, — mi aŭdas, ke lia koro ankoraŭ batas..."

Jegor Drjomov restis viva, kaj eĉ ne perdis vidkapablon, kvankam lia vizaĝo tiom estis karbigita, ke en kelkaj lokoj estis vidataj ostoj. Li troviĝis en hospitalo dum ok monatoj. Oni faris multajn plastiajn operaciojn, restaŭris liajn nazon, lipojn kaj orelojn. Post ok monatoj, kiam oni demetis bandaĵojn, li rigardis la sian, sed jam ne sian vizaĝon. Flegistino, kiu donis al li speguleton, deturnis la vizaĝon, kaj ekploris. Li tuj redonis la speguleton.

— Ofte okazas pli malbona situacio, — li diris, — kun la difekto oni povas vivi plu.

Li ne petis plu la flegistinon doni al li la speguleton, nur ofte palpis sian vizaĝon, kvazaŭ kutimiĝis al ĝi. Medicina komisiono aprobis lin kiel kapablan por servo en nebatalaj trupoj. Tiam li vizitis generalon, kaj diris: "Mi petas vian permeson reveni al mia regimento". — "Sed vi estas invalid" — diris la generalo. "Tute ne, mia vizaĝo estas monstra, sed tio ne malhelpos al militservo, kaj mi plene restarigos batalkapablon". (La generalo dum parolado penis ne rigardi lin, kaj Jegor Drjomov rimarkis tion, sed nur subridis per siaj lilaj, rektaj kiel fendo, lipoj.) Li ricevis dudektagan forpermeson por plena resaniĝo, kaj veturis hejmen al la gepatroj. Tio okazis ĉijare en marto.

En la stacio li planis uzi ĉaregon, sed estis devigata perpiede iri dekok verstojn. Ĉirkaŭe ankoraŭ kuŝis neĝo, humidis, etendiĝis dezerta loko. Tre malvarma vento ofte kuspis baskojn de lia uniforma palto, kaj sopire fajfetis en liaj oreloj. Li atingis la vilaĝon kiam jam vesperiĝis. Jen konata baskulputo, kiu balanciĝis kaj knaris. De ĉi tie la sesa lignodomo estas la gepatra. Li subite haltis, la manojn enŝovis en la poŝojn, kaj iomete skuis la kapon. Li aliris deflanke al la lignodomo. En neĝo ĝis la genuoj, klinante sin al fenestro, li ekvidis sian patrinon. En malhela lumo de murlampo, pendanta super tablo, ŝi planis vespermanĝi. En la sama malhelkolora kaptuko, ŝi aspektis kiel ĉiam kvieta, nehastema kaj bonanima. Ŝi iĝis pli maljuna kun akraj maldikaj ŝultroj... "Se mi antaŭe vidus tion, mi ĉiutage skribus al ŝi eĉ kelkajn vortojn pri mi..." Ŝi surtabligis simplajn aĵojn por manĝi: telero kun lakto, panpeco, du kuleroj, salujo, kaj, starante antaŭ la tablo, kunigante la malgrasajn manojn sub la brusto, enpensigis... Jegor Drjomov, tra la

fenestro rigardanta al la patrino, komprenis, ke estus tre malbone timigi ŝin, ĉar ŝia olda vizaĝo nepre malespere ekstremus.

Nu, bone! Li malfermis barilpordon, eniris en korton, kaj surperone ekfrapis pordon. Post la pordo la patrino demandis: “Kiu estas?” Li respondis: “Leŭtenanto, Heroo de Sovetunio, Jegor Gromov”. Lia koro forte ekbatis, kaj li apogis sin per la ŝultro kontraŭ lintelo. Ho ve, la patrino ne rekonis lian voĉon. Li mem, kvazaŭ unuafoje ekaŭdis sian voĉon, kiu ŝanĝiĝis post multaj operacioj. Ĝi iĝis raŭka, obtuza, neklara.

— Estimata, kio necesas al vi? — ŝi demandis.

— Al Marja Polikarpovna mi trandonas saluton de ŝia filo, ĉefleŭtenanto Drjomov.

Tiam ŝi malfermis la pordon, kaj ĵetis sin al li, kaptis liajn manojn: “Ĉu estas viva mia Jegor? Ĉu li sanas? Estimata, eniru en la lignodomon.”

Li sidiĝis sur benko ĉetoble en la sama loko, kie sidis, kiam liaj piedoj ankoraŭ ne atingis plankon, kaj la patrino, karesante lian buklan kapon, diris: “Manĝu, karuleto”. Li komencis detale rakonti pri ŝia filo, t.e. pri si mem, kiel li manĝas, trinkas, ke li bezonas nenion, ĉiam sanas, ĝojas, kaj iomete priskribis batalojn, kie li partoprenis en sia tanko.

— Vi diru, ĉu oni timas en la milito? — ŝi ofte interrompis lin, rigardante lian vizaĝon per la malhelaj, jam ne tre bone vidkapablaj okuloj.

— Jes, certe, oni tre timas, tamen poste alktimiĝas.

Alvenis lia patro, Jegor Jegoroviĉ, kiu ankaŭ maljuniĝis dum la lastaj jaroj, — lia barbeto kvazaŭ kovriĝis de faruno. Rigardante al la gasto, li kelkfoje tretis sojlon per malnovaj feltbotoj, malrapide disvolvis koltukon, demetis peltjakon, aliris al la tablo, kaj salutis permane, — ho, tre konata estis lia vasta justa gepatra mano! Nenion demandante, ĉar estis tute klare por kio vizitis la gasto kun ordenoj surbruste, sidiĝis kaj ankaŭ komencis aŭskulti kun la duonfermitaj okuloj.

Ju pli daŭre leŭtenanto Drjomov sidis nereconebla, kaj rakontis pri si mem kaj ne pri si, des pli ne eblis al li malkovriĝi antaŭ la gepatroj, ekstari kaj diri: nu, patro kaj patrino, rekonu do min, monstrol! Ĉe gepatra tablo li sidis kontenta, kaj samtempe ofendita.

— Nu, ni vespermangu. Patrino, preparu ion por la gasto. — Jegor Jegoroviĉ malkovris pordeton de malnova ŝranketo, kie ĉiam dekstre kuŝis fiŝhokoj en alumetskatolo, kaj live staris bolkruĉo kun difektita verŝbeko, kaj kie odoris je paneroj kaj ŝelo de cepo. El la ŝranketo li eligis flakonon kun vino por du glasetoj, kaj suspiris, ke ne eblas akiri pli multe. Ili komencis vespermanĝi kiel en antaŭaj jaroj. Kaj nur dum manĝado, leŭtenanto Drjomov rimarkis, ke lia patrino tre atente rigardas al lia mano kun kulero. Li tuj subridis, la patrino levis la okulojn, kaj ŝia vizaĝo malsane ekstremis.

Ili parolis pri deversaj temoj: kia estos la printempo, ĉu sukcesos semado, ke ĉi-somere verŝajne finiĝos la milito.

— Kial vi opinias, Jegor Jegoroviĉ, ke en nuna somero finiĝos la milito?

— La popolo ekkoleris, — respondis Jegor Jegoroviĉ, — ĝi trairis morton, nun ne eblas haltigi tiun, kaj la germanoj fiaskos.

— Vi ne informis nin, kiam oni donos ripoztagojn al li, por viziti nin. Dum tri jaroj mi lin ne vidis. Verŝajne li iĝis jam pli plenaĝa, havas lipharojn, iras ĉiutage apud morto, kaj lia voĉo iĝis pli kruda. Ĉu?

— Jen kiam li alveturos, povas esti, ke vi ne rekonos lin.

Oni proponis al li tranokti sur forno, kie li memoris ĉiun brikon, ĉiun

fendon en ligna muro, ĉiun branĉeton en plafono. Odoris je ŝaffelo, pano, je tiu hejma komforto, kiu ne forgesiĝas eĉ antaŭ la morto. Marta vento fajfetis super tegmento. Malataŭ septo iomete ronkis la patro. La patrino ne dormis, nur kuŝante turnis sin jen sur unu flankon, jen sur la alian, kaj sopiris. La leŭtenanto kuŝis ventraltere, kun la vizaĝo kontraŭ la manplatoj: “Ĉu ŝi efektive ne rekonis min, — li pensis, — ĉu efektive...? Panjo, panjo...”

Matene li vekigis pro knarado de brulligno. La patrino singarde klopodis ĉe la forno. Sur etendita ŝnuro pendis liaj lavitaj piedĉifonoj, kaj ĉe la pordo staris puraj botoj.

— Ĉu vi manĝas tritikajn krespojn? — ŝi demandis.

Li ne tuj respondis, malsuprengrimpis de sur la forno, surmetis uniforman ĉemizon, fiksitis ĝin per zono, kaj sensua sidigis sur la benko.

— Respondu al mi, ĉu en via vilaĝo loĝas Katerina Maliŝeva, filino de Andrej Stepanoviĉ Maliŝev?

— En pasinta jaro ŝi finis kursojn, kaj nun laboras kiel instruisto. Ĉu vi volas vidi ŝin?

— Via filo tre petis transdoni saluton al ŝi.

La patrino sendis najbaran knabinon al Katerina. La leŭtenanto eĉ ne sukcesis surmeti la botojn, kiam jam alkuris Katerina Maliŝeva. Ŝiaj larĝaj grizaj okuloj brilis, la brovoj mire altiĝis, sur la vangoj estis ĝoja ruĝo. Kiam ŝi mallevis de sur la kapo trikitan kaptukon sur la vastajn ŝultrojn, la leŭtenanto nerimarkeble eĉ ekĝemis: kiel mi kisas tiujn varmajn helajn harojn!.. Nur similan amikinson li imagis, — freŝa, tenera, ĝoja, bonanima, bela. Ŝi eniris, kaj tuj la tuta lignodomo iĝis orkolora...

— Ĉu vi alportis saluton de Jegor? (Li staris dorse kontraŭ lumo, nur klinis la kapon, ĉar ne povis paroli.) Mi atendas lin tag-nokte, tiel diru al li...

Ŝi proksimiĝis, ekrigardis al li, kaj, kvazaŭ oni frapetis kontraŭ ŝia brusto, tuj timigite deflankiĝis. Post tio li firme decidis forlasi la hejmon, — nepre en la sama tago foriri.

La patrino preparis tritikajn krespojn kun lakto. Li denove rakontis pri leŭtenanto Drjomov, ĉifoje pri liaj militaj heroaĵoj. Li rakontis kruele, kaj ne levis la okulojn direkte al Katerina, por ne vidi sur ŝia ĉarma vizaĝo reflekon de sia monstrec. Jegor Jegoroviĉ komencis klopedi por dungi kolhozan ĉevalon, sed Drjomov foriris perpiede al la stacio, de kie antaŭe aliris. Li estis tre deprimita de ĉiuj okazaĵoj, eĉ haltante, per la manplatoj ofte frapis kontraŭ sia vizaĝo, kaj ripetis per raŭka voĉo: “Kion do mi faru nun?”

Li revenis al sia regimento, kiu situis tre fore de frontlinio por komplektiĝi per novaj armeanoj. Liaj kunbatalantoj renkontis lin kun tia sincera ĝojo, ke tuj malaperis en lia animo tio, kio antaŭnelonge permesis al li nek dormi, nek manĝi, nek spiri. Li decidis, ke la patrino pli longe ne sciu pri lia malfeliĉo. Kio rilatas al Katerina, tiun dornon li elŝiros for el sia koro.

Post du semajnoj alvenis letero de la patrino:

“Saluton, mia tutkore amata fileto. Mi timas skribi al vi, ĉar ne scias kion supozi. Nin vizitis unu persono, kun via saluto. La homo estis tre bonanima, nur kun tre malbela vizaĝo. Li volis gastigi en nia hejmo, sed tuj forveturis. Ekde tiu momento, mia fileto, mi tute ne dormas, ĉar ŝajnas al mi, ke vi mem vizitis nin. Jegor Jegoroviĉ insultas min pro tio. Li diras, ke mi tute freneziĝis: se li estus nia filo, ĉu li ne konfesus... Kial li devis kaŝi sin, se li estis nia filo. Kun tia vizaĝo, kiun havis la gasto, necesas fieri. Jegor Jegoroviĉ sukcesis admoni min, sed mia patrino koro sugestis: vi estis, vi vizitis nin!.. Tiu homo dormis sur la forno. Mi

elportis lian uniforman palton en la korton por purigi ĝin, apogis sin al la vestaĵo, kaj ekploris, — vi estas, estas via uniformo!.. Jegorĉjo, skribu al mi, por Kristo klarigu al mi, kio okazis? Aŭ reale mi freneziĝis...”

Jegor Drjomov montris la leteron al mi, al Ivan Sudarev, kaj, rakontante sian historion, permanike viŝis siajn okulojn. Mi diras al li: “Jen interpuŝiĝis karakteroj! Malsaĝulo vi estas, stultulo. Tuj skribu al via patrino, petu ŝian pardonon, ne frenezigu ŝin... Via aspekto tute ne gravas por ŝi! Tian, kia vi estas nun, ŝi pli forte komencos ami”.

En la sama tago li skribis la leteron: “Karaj miaj gepatroj, Marja Polikarpovna kaj Jegor Jegoroviĉ, pardonu min pro mia senscieco, efektive mi estis via gasto, via filo...” Kaj tiel plu, kaj tiel plu, sur kvar paĝoj per malgrandlitera skribkaraktero. Li ankaŭ skribus sur dudek paĝoj, se oni permesus.

Foje post kelka tempo ni staras sur paŝkampo. Alkuras soldato, kaj diras al Jegor Drjomov: “Kamarado kapitano, oni vokas vin...” Lia mieno estas tia, kvazaŭ li intencas drinki, kvankam li staras kiel devas stari antaŭ estro. Ni ekiris al plansetlejo, en lignodomon, kie mi loĝis kun Drjomov. Mi rimarkis, ke dum irado li maltrankviliĝas kaj ĉiam tuŝetas... Mi pensas: “Ankaŭ tankisto havas nervojn”. Ni eniras en la lignodomon. Li iris antaŭ mi, kaj mi aŭdas:

“Panjo, saluton, jen estas mi!..” Mi vidas kiel eta oldulino apogis sin al lia brusto. Mi ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis ankoraŭ unu virinon. Mi honeste diras, verŝajne ekzistas ie ajn ankoraŭ belulinoj krom ŝi, sed tian belegan ĝis nun mi ankoraŭ ne vidis.

Li portempe lasis sian patrinon, kaj aliris al la virino. Mi jam memorigis, ke li kun sia atleta konstitucio aspektis kiel dio de milito. “Katerina, kial vi alveturis? Vi promesis atendi tiun ulon, sed ne nunan min...”

Mi, kvankam foriris en la vestiblon, tamen aŭdas kiel bela Katerina respondas al li: “Jegor, mi kun vi intencas vivi por ĉiam. Mi amos vin, tre amos ... Ne forsendu min...”

Jes, jen estas la rusaj karakteroj. Ŝajnas, ke homo estas ordinara, tamen se alvenos malfeliĉo, ĉu granda aŭ eta, tiam aperas en li tre ega forto — la homa beleco.

1942–1944

Elrusigis Gennadij Ŝlepĉenko, Vladivostoko



Alrondo kaj la magia vulpo

Eŭgenij Ĥaritonov (St-Peterburgo)²

Ĉu vi aŭdis la historion de Alrondo kaj la magia vulpo? Mi povas rerakonti ĝin al vi.

Ja magiaj vulpoj ankoraŭ vivas en iuj lokoj en la mondo ĝis hodiaŭ. Estas preskaŭ neeble kapti ilin, ĉar ili estas tre fortaj en magio. Kaj foje, kiam tia vulpo kuras tra la arbaro kaj tuŝas la branĉojn kaj arbustojn per sia vosto, fajreroj flugas de la vosto al la ĉielo, kaj tiam falas reen al la tero; homoj nomas ĉi tiujn fajrerojn falsteloj. Tamen kelkfoje magiaj vulpoj aperas inter la homoj. Jen kio rakontos nia rakonto.

Iam vivis maljuna kavaliro loĝanta ĉe Kabo Bertoari, kaj li havis tri filojn. Kiam la maljunulo mortis, la plej aĝa filo heredis la kastelon kaj la tutan teron, laŭ kutimo, la meza filo heredis la paro paroĥon en la vilaĝo kaj la postenon de pastro, kaj la plej juna, Alrondoo, ricevis nur la glavon de sia patro kaj maljunan ĉevalon. La pli aĝa frato donis al Alrondoo panon kaj ŝinkon por la vojaĝo, kaj diris al li foriri por serĉi sian riĉaĵon aliloke.

Alrondo pretiĝis por la vojaĝo kaj pensis pri irado al Adtiarno al la kortego de reĝo Taravono. Li, homoj diras, pagas la kuraĝajn kaj lertajn nobelulojn bonaspekte. Kaj Alrondo iris al la urbo Adtiarnoo.

Iom da tempo pasis, Alrondo laciĝis kaj malsatis, kaj sidiĝis por manĝi ĉe la arbara rando. Jen, vulpa vizaĝo elŝoviĝis de malantaŭ arbeto de viburno. La vulpo rigardas Alrondon, kaj Alrondo rigardas la vulpon. Kaj la vulpo diris al li:

– Bonan posttagmezon, junulo! Bela ŝinko, kiun vi havas tie. Ĉu vi dividus kun mi la pecon?

Kaj kvankam Alrondo ne havis alian manĝaĵon krom tiu pano kaj ŝinko, li estis bona bubo, do li donis al la vulpo peceton da ŝinko, kaj rakontis al li, kiel liaj fratroj traktis lin, kaj ke li iras al Adtiarnoo al la kortego de Reĝo Taravono.

– Rigardu, – diris la vulpo, – eble mi akompanu vin por provi ankaŭ mian sorton? Vi estas bonulo, mi vidas, sed vi estas tre simpla, kaj mi bone spertas ĉiajn ruzojn, kaj eble mi povas ankaŭ servi vin. Kaj kiam ni alvenos al Adtiarnoo, vi faruĝu gardisto de reĝo Taravono, kaj mi estos interpretisto por kanceliero Berengaro. Mi scias ĉiajn lingvojn: garegian, adelnian, kaj eĉ la lingvon de la Igeruldo.

– Nu, – diris Alrondo, – dumvoje estas pli amuze esti kune. Venu kun mi!

Kaj ili iris al la urbo Adtiarnoo. Poste ili venis, kaj Reĝo Taravono prenis nian Alrondon kiel sian personan gardiston, ĉar la kapitano de la gardistoj estis malnova amiko de la forpasinta patro de la junulo, kaj Alrondo similis sian patron laŭ la vizaĝo, kuraĝo kaj inteligenteco. Kaj la vulpo ekloĝis ĉe la kancelaria kortumo kaj surprizis ĉiujn per sia scipovo de lingvoj: la skribistoj, la konsilistoj, la kanceliero kaj la reĝo mem estis surprizitaj kaj mirigitaj pri la saĝo de la vulpo.

² La fabelo estas verkita en la rusa, sed poste tradukita de la aŭtoro mem al la angla kaj Esperanto.

La reĝo havis fianĉinaĝan filinon. Tuj kiam ŝi vidis Alrondon, ŝi freneze ekamis lin; la junulo ankaŭ ne estis indiferenta al la princino. Sed estis kutimo en la regno, ke ne nur la princino povis elekti la viron, al kiu ŝia koro kuŝis laŭ ŝia propra kontrolo, sed eĉ la patro-reĝo mem ne povis, kiel okazas en preskaŭ ĉiuj regnoj, svati la filinon laŭ laŭ sia propra opinio: devis esti granda konkurso, kaj kiu ajn venku en ĝi, tiu devas ankaŭ ricevi la manon de la princino. Kaj ĉar la princino estis edziniĝebla fraŭlino, kaj la sola filino de reĝo Taravono, kaj la reĝo mem jam estis en sia maljunaĝo, la kanceliero kaj la konsilistoj komencis ĝeni lin, ke li baldaŭ aranĝu konkurson kaj edzinigu la princinon.

– Ni volas, – ili diras, – havi taŭgan posteulon por vi – gloran, kuraĝan, inteligentan kaj ĉiel indan princon aŭ kavaliro; ni ne bezonas alian specon de reĝo!

La reĝo devis cedi kaj aranĝi la konkurson. Alrondo revenis hejmen de la servo malĝoja, kaj la vulpo demandas lin:

– Kial vi estas tiel malĝoja, mia amiko? Kial vi mallevis vian nazon?

– Kial mi ne mallevu mian nazon! – respondas Alrondo. La reĝo deklaris konkurson, kaj kiu gajnos ĝin, tiu ricevos la manon de la princino, kaj mia amata iros al la fremda princo aŭ kavaliro.

– Kial vi ne partoprenu en la konkurso? – diris la vulpo. Kvankam via patro estis malriĉa kavaliro, kaj vi estas eĉ pli malriĉa, via familio estas nobla kaj via genealogio ne estas pli malalta ol tiu de la reĝoj. Cetere vi estas viro forta kaj eltrovema!

– Vere, – diris Alrondo, – sed mi sentas, ke la testoj tie ne estos la kutimaj: batali per lancoj, pafi per pafarko kaj batali per glavo.

– Sed vi havas min! Mi helpos vin dum la reĝaj provoj, – diris la vulpo.

Alrondo pripensis la aferon kaj konsentis. Kaj la vulpo svingis sian voston, kaj oraj sparkoj falis sur la junulon – kaj kvankam Alrondo antaŭe estis bela, kaj ankaŭ aŭdaculo kiel malmultaj, nun li brilis per magia lumo, kaj li havis la forton de tridek fortaj viroj.

Kiam venis la tempo por la konkurso, reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj de la tuta okcidenta marbordo, kaj iuj eĉ de insuloj de la insularo, venis al Adtiarno. La unuaj tri tagoj ili pasigis en turniroj, ĉasado kaj festenoj; kaj Alrondo estis antaŭ la aliaj en ĉiuj aferoj: en lanĉbatalo, glavbatalado, arkpafado, kruĉpafado kaj dancado, kaj li kondukis tiel ĝentile – kiel vera svatanto por princino! Sed la reĝaj procesoj estis pli malfacilaj ol la kortaj dancoj.

Estis tempo por la unua testo. Kaj la reĝo diris:

– La duko Larhelmo de Moremonto donis al mi pasintjare mirindajn semojn, kiuj produktas rikolton de kvincent, kaj pano farita el tiu tritiko havas tiel mirindajn ecojn, ke unu malgranda peco sufiĉas por nutri plenkreskulon. Miaj kamparanoj semis ĉi tiun miraklan grenon en la kampoj, kaj efektive, la rikolto estis senprecedenca. Tamen estas malfeliĉo: iu venas nokte kaj mangas tritikon. Kaj kiam mi sendas la gardistojn por kapti nekonatan ŝteliston, ili ĉiuj endormiĝas. Kiu el vi, gloraj kavaliroj, protektos miajn kampojn de mirinda tritiko, kaj samtempe kaptos la misteran rabiston kaj venigos lin al mi?

Ĉiuj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj estis perpleksaj, same kiel Alrondo. Li venis hejmen kaj rakontis al la vulpo pri la reĝa misio. Kaj la vulpo diris:

– Mi scias, kiu ŝtelas la tritikon – ĝi estas la *proboscisa* monstro. Aŭskultu min, dormu nokte, kaj ni iru rigardi la ŝteliston nokte. Nur ne forgesu ŝtopi viajn orelojn.

Tiel ili faris. Kaj kiam nokte ĉiuj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj eliris por gardi la kampon, la *proboscisa* monstro venis al ĝi kaj ekfajfis – tiam ĉiuj ekdormis. Alrondo kovris siajn orelojn, kiel la vulpo diris al li, kaj ne ekdormis. Tuj kiam la ŝtelisto komencis paŝtiĝi sur la reĝaj kampoj, Alrondo kaj la vulpo komencis kapti la *proboscisan* monstron. Longe ili ne povis elteni ĝin, ĝis la vulpo saltis sur la *proboscisan* monstron kaj jetis ŝnuron sur ĝin.

Matene Alrondo alportis la *proboscisan* monstron al la reĝo. La reĝo surpriziĝis, laŭdis kaj dankis Alrondon. La eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj enviigis: ili dormis la tutan nokton dum Alrondo kaj la vulpo kaptis la *proboscisan* monstron! Kaj ili konspiris kontraŭ Alrondo, sed ili ne montris tion.

Estis tempo por la dua testo. Kaj la reĝo diris:

– Pasintjare Reĝo Aetelstano de Damirio donis al mi aron da oraj ŝafoj. Nun estas tempo por tondi ilin. Ilia lano estas pura oro, sed mi devas diri, ke ĉi tiuj ŝafoj estas tre rapidaj, kaj ĝis nun neniu sukcesis tondi ilin. Kiu el vi, gloraj kavaliroj, povas tondi la ŝafojn kaj kolekti la oran lanon kaj alporti ĝin al mi?

Ĉiuj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj estis perpleksitaj, same kiel Alrondo. Li venis hejmen kaj rakontis al la vulpo pri la reĝa misio. Kaj la vulpo diris:

– Tio ne malfacilas, mia amiko Alrondo. Aŭskultu min, dormu nokte, kaj morgaŭ ni iros tondi la orajn ŝafojn.

Matene la pretendantoj je la mano de la princino ekkaptis orflekajn ŝafojn, sed la ŝafoj estis tre rapidaj kaj kuraĝaj kaj neniu sukcesis fortondi de ili pecon da ora lano. Finfine venis la vico de Alrondo. Tiam la vulpo, lia fidela amiko, sidigis sur monteto, kie paŝtiĝis la ŝafoj, elprenis sian fluton kaj ekludis. Ho, se vi nur povus imagi, kiu muziko ĝi estis! Ĉiuj ŝafoj kolektiĝis ĉirkaŭ la vulpo kaj aŭskultis la magian muzikon kvazaŭ sorĉitaj, kaj nun estis facile por Alrondo tondi ilin.

Kaj ne nur la ŝafoj estis sorĉitaj! La klara sono de tiu muziko ravis la reĝon, la korteganojn, la sekvantaron kaj ĉiujn, kiuj estis tie; ili ĉiuj eksilentis kaj aŭskultis kvazaŭ konsternitaj. Sovaĝaj arbaraj bestoj eliris el siaj truoj kaj nestoj por aŭskulti la mirindan muzikon de la vulpo. La leono, la reĝo de ĉiuj bestoj, ne kuraĝis grumbli, por ke li ne interrompu la mirindan muzikon, la lupo forgesis sian ululon, kaj la sovaĝa virbovo forgesis sian muĝon. Eĉ maljuna Greta, kiu loĝas ĉe la Truo proksime al la Ĉirkaŭfosaĵo kaj estas fama pro la plej malbona karakterpo (ŝi ne povas esti kun la aliaj dum minuto sen riproĉado), do eĉ maljuna Greta mem eliris kaj aŭskultis la muzikon. La melodio, kiun la vulpo produktis el sia fluto, faris la tutan ĉirkaŭaĵon muzika templo.

La Reĝo raviĝis pri tio, ke Alrondo plenumis la duan taskon, kaj double lin ravis, ke li aŭdis tian magian muzikon. Li sincere dankis Alrondon kaj la vulpon, kaj la eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj preskaŭ krevis pro envio kaj kolero. Kaj unu el ili, la reĝo Gernebo de Lothirodo, diris:

– Se ĉi tiu kavaliro trapasos la trian teston, li havos la principon, kaj ni foriros ne rekompencitaj kaj eĉ mallonoritaj, kaj iu kompatinda soldato estos pli alta ol ni, la kronitaj kapoj! Ni embuskos lin morgaŭ matene antaŭ la tria testo kaj mortigos lin, kaj tiel ni ne devos suferi malhonoron.

Ili ĉiuj decidis fari tion. Sed ili ne sciis, ke la vulpo tiam staras malantaŭ la kurteno kaj aŭdis ĉion. Li venis hejmen kaj rakontis al Alrondo pri la insidaj planoj de la fremduloj.

– Kion mi faru tiam? – diris la junulo.

– Fidu min, – la vulpo respondis, – sed nur memoru, ke ni ambaŭ devas venki niajn malamikojn morgaŭ kaj trapasi la lastan teston!

Estis tempo por la tria kaj fina testo. Kaj la reĝo diris:

– Mi volas, ke mia estonta bofilo regalu min per luksa vespermanĝo en sia propra kastelo, kaj ĉi tiu vespermanĝo devas esti reĝa! Mi ne donos mian filinon por almuzulo.

Eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj alarmiĝis. Komprenoble ili havis grandiozajn palacojn kaj kastelojn en sia regiono – sed vi ne povas preni reĝon tien en unu tago, nek vi povas alporti ĉi tiujn palacojn kaj kastelojn al Adtiarno, kiom ajn vi laboru! La kvar plej riĉaj reĝoj tamen dungis po cent masonistojn, kaj ordonis al ili konstrui kastelojn proksime al la ĉefurbo tuj – sed vi ne povas konstrui kastelon dum unu tago! Ankaŭ Alrondo aspektis malĝoja, sed la vulpo puŝetis lin kaj diris:

– Mi iros akiri al vi kastelon por la reĝa festo, kaj kiam vi nun ĉasos, tenu vin for de la fremduloj!

Kaj la vulpo kuris direkte al Kastelo Kromorgano. Kaj mi devas diri, ke ĉi tiun kastelon posedis terura trolo, malbon-malestiminda, kruela-ia. Multaj vojaĝantoj, kiuj preterpasis la kastelon Kromorganon, alvenis en la dentojn de tiu malbela ogro. Sed la trolo manĝis homojn kaj ne vulpojn, do nia vulpo havis nenion timindan; cetere la trolo ne estis hejme tiutempe – li eliris por ĉasi. Unue la vulpo decidis forigi la servistojn de la trolo, kiuj gardis la kastelon; tiuj estis gnolo Graŭo, koboldo Groŭo kaj gremlino Grahahamo. Li kuris al la pordego kaj kriis:

– Alarmo! Eskapu! Jen venas la reĝo kun sia armeo kaj kunportas cent sorĉistojn: ili forbruligos vin ĉiujn per fulmo!

La servistoj de la trolo alarmiĝis. Kion ili faru? Kaj la vulpo diris al ili:

– Kaŝu vin rapide; eble la reĝo kaj lia armeo kaj sorĉistoj ne rimarkos vin!

La servistoj de la trolo estis malkuraĝaj, do ili forlasis siajn gardistajn postenojn sen momenta prokrasto. La gnolo Grao kaŝis sin en bierkrucŭo, la koboldo Groŭo kaŝiĝis en vinbarelo, kaj la gremlino Grahahamo kaŝis sin en barelo de pombrando (la trolo tre ŝatis pombrandon). Tiam nia vulpo fermis ĉiujn, ruliĝis ilin sur la fortikaĵan muron kaj ĵetis ilin en la ĉirkaŭfosaĵon –ili naĝu tie!

Dume la malbona trolo, la mastro de la domo, revenis, kaj tute surpriziĝis, ke liaj servistoj malaperis, kaj ke stranga vulpo aperis de nenie en lia propra kastelo. Sed nia vulpo estis ege ĝentila sinjoro, do por li ne estis malfacile ĉarmi la trolon. Sciante, ke la trolo tre ŝatas flatadon, la vulpo komencis ĉiamaniere priskribi la meritojn de la trolo kaj la famon, kiu ekzistas pri li en ĉiuj ĉirkaŭaj regnoj.

Kaj mi devas diri, ke ĉi tiu trolo havis du kapojn kaj ili ofte kverelis inter si. Kaj jen kion elpensis la vulpo – li plurfoje donis pli kaj pli buntajn komplimentojn al unu aŭ alia kapo, ĝis fine ili tiel multe kverelis, ke ili finis per mortiga batalo. Tiam la vulpo mallaŭte ŝteliris al la loko, kie la trolo havis siajn akrajn kaj kurbajn sabrojn, kiel tiuj, kiujn kamelistoj uzas en la dezerto por batalo, kaj per lerta bato fortranĉis ambaŭ malpacajn kapojn de la malbona trolo. Kaj de tiam, neniu iam ajn kaptis aŭ mortigis vojaĝantojn en tiuj lokoj!

Dume, la reĝo Taravono ĉasis kun siaj korteganoj, sekvantaroj kaj eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj, kiuj, kiel vi memoros, konspiris mortigi Alrondon. Por serĉi la cervon, Alrondo liberiĝis de la tuta sekvantaro kaj restis sola, kaj tiam la fremduloj komencis postkuri lin. Iliaj glavoj estis eltiritaj, iliaj arbalestoj ŝarĝitaj, kaj tio estus la fino de la junulo, se li ne havus sian vulpon!

Kaj la vulpo, ekposedinte la grandiozan kastelon de la fiula trolo kaj ordoninte pretigi veran reĝan regalon tie, rapidis al la arbaro, kie la ĉaso okazis. Tiutempe estis tre malnova kaduka ponto en ĉi tiu arbaro. Do, kiam la malamikoj persekutis Alrondon kaj pafis al li per siaj arbalestoj, la vulpo (kaj li estis magia vulpo!) pormelonge transformis sian amikon en vulpan formon kaj kaŝis lin en truo, kaj la vulpo mem transformiĝis je junulo, sama kiel Alrondo, vi eĉ ne distingus ilin! La eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj rapidis post li, kaj la vulpo en la formo de Alrondo saltis de sia ĉevalo kaj kuris trans la malnovan ponton al la alia flanko. La fremduloj, pensante, ke ilia viktimo estas en iliaj manoj, rapidis post li al la kaduka ponto, kaj la ponto kolapsis, do ili ĉiuj pereis.

Dume, la reĝo malsatis kaj atendis vespermanĝon. La vulpo redonis al Alrondo la homan formon kaj al si – la sian vulpan, kaj ili revenis al la reĝo.

– Via Moŝto, – la vulpo diris ĝentile, – Sinjoro Alrondo havas la honoron inviti vin vespermanĝi en sia kastelo.

La reĝo surpriziĝis.

– Kiel, Alrondo? La kastelo de via patro estas dek tagojn da veturo de ĉi tie, kaj ĝi apartenas al via pli aĝa frato laŭ la rajto de la heredo.

– Mi certigas vin, Via Moŝto, – la vulpo rapidis diri, – ke kavaliro Alrondo havas kastelon, kaj plej grandiozan.

Kaj la vulpo kondukis Alrondon, la reĝon kaj la tutan sekvantaron de la reĝo al la kastelo Kromorgano, kiu iam apartenis al la malbona trolo, kaj nun ĝi apartenis al la amiko de la vulpo, la kavaliro Alrondo. Kiam ili atingis la kastelon, la reĝo tre ĝojis, ĉar la kastelo Kromorgano estis tiel bona kiel reĝa palaco, kaj la akcepto, kiun la vulpo kaj Alrondo disponigis por la reĝo kaj lia sekvantaro, estis vere reĝa. La reĝo estis tre ĉarmita, kaj en la sama vespermanĝo anoncis la gefianĉigon de Alrondo kaj la Princino, kaj nomumis Alrondon heredonto de la trono.

Kio do pri la magia vulpo? Kaj la vulpo, kiam la geedziĝo finiĝis, adiaŭis kaj forkuris en la arbaron; finfine li ankoraŭ estis sovaĝa besto, kvankam poste li iafoje vizitis sian amikon. Kaj Alrondo finfine fariĝis reĝo

Jen ĝi, miaj amikoj!



Korekto al la rezultoj de la Belartaj Konkursoj – potencialaj partoprenontoj, atentu!

INFORMO DE LA KOMISIONO PRI LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA: NULIGO DE PREMIOJ

La Belartaj Konkursoj de UEA (BK) havas regularon, kies bazaj principoj, krom tio, ke ili laŭiĝas al la protokoloj kaj normoj ĝenerale sekvataj de ĉi-specaj konkursoj ie ajn en la mondo, estas de ni diskonigitaj kadre de niaj ĉiujaraj alvokoj al partopreno. En ĉi tiuj, krome, la BK-Sekretario ĉiam aldonas jenon: “detala regularo troviĝas en la retejo de UEA”:

[uea.org/teko/regularoj/belartaj konkursoj](http://uea.org/teko/regularoj/belartaj_konkursoj)

Konvenas do, ke antaŭ ol konkursi BK-konkursantoj tralegu tiun regularon por agi laŭe al ĝi. La artikolo 2.3 de tiu regularo tekstas jene:

Nevalidaj por la Konkursoj estas verkoj aperintaj en presa aŭ en alia formo, inkluzive de publika legado, radia, televida, reta aŭ bita dissendoj ks. Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri unua aperigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la aperigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu tamen konsentas cedi ĝin senpage en okazo de eldono de almanako aŭ antologio de la Belartaj Konkursoj, kondiĉe ke tiu aperu kun la aprobo de UEA.

Nu, ĉi-jare, samkiel pasintjare, kadre de sia Virtuala Kongreso de Esperanto, UEA proponis al ni aranĝi Virtualan BK-Feston, ene de kiu la 19-an de septembro ni diskonigis la nomojn de la verkoj kaj aŭtoroj premiitaj en BK 2021 [youtu.be/NE1Ye1eh6o4]. Nur poste diverslandaj esperantistoj avertis nin pri tio, ke la cirkonstancoj ligitaj al du el la premiitaj verkoj kontraŭstaras la postulojn de la artikolo 2.3 de nia regularo. Temas pri *Robinson*, de Petro Palivoda el Ukrainio, kiu ricevis la Trian Premion en la branĉo Kantoteksto, kaj pri *Koren de mallumo*, de Mihail Frolov el Rusio, kiu ricevis la Unuan Premion! en la branĉo Poezio.

La BK-Komisiono esploris la aferojn kaj konstatis, ke tiuj avertoj respondas al plej pura fakto. La BK-Komisiono deziras substreki, ke tiuj esploroj neniel rilatas al iel “polica kontrolo”, kio eksteras al niaj sintenoj, sed al la respekto ŝuldata al la konkursantoj, kiuj skrupule plenumas la regulojn por partopreno en la Belartaj Konkursoj. Jen la konkludoj de la BK-Komisiono:

1-La filmeto *Robinson*, interalie, jutube spektblas, kaj la teksto premiita sub tiu titolo tiukadre legeblas kiel ĝia subteksto, ekde la 29-a de septembro 2021. Kaj tio kontraŭstaras la parton de la artikolo 2.3, kiu indikas jenon: *Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri unua aperigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la aperigon.*

2-Sub la nomo *Koren de malhelo*, Mihail Frolov konkursis en la aranĝo “Poezio el ĉiuj ĉieloj”, kunvokita de la itala organizo “Sicilia Esperantista”, antaŭ ol li sendis al BK sian *Koren de mallumo*, kiu enhavas identajn versojn kiel *Koren de malhelo*. En la itala konkurso tiu verko ricevis Honoran Mencion, kio estis anoncita la 10-an de junio, nome post la limdato por akcepto de BK-konkursoj, kiu ĉi-jare, escepte, estis la 30-a de aprilo, anstataŭ la kutima 31-a de marto. En ordo. La problemo kuŝas en tio, ke en junio 2021 estis finpresita libro kun la tekstoj de ĉiuj verkoj premiitaj en la konkurso “Poezio el ĉiuj ?! ?ieloj&rd quo;”, kaj tio kontraŭstaras la parton de la artikolo 2.3, kiu indikas jenon: *Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri unua aperigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la aperigon.*

Pro ĉio ĉi-supre elmetita, la Komisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA vidas sin en la tre bedaŭrinda devo nuligi la Trian Premion aljuĝitan al la teksto *Robinson*, de Petro Palivoda, en la branĉo Kantoteksto kaj la Unuan Premion en la branĉo Poezio, aljuĝitan al *Koren de mallumo*, de Mihail Frolov.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 992, 2021-10-24

Respondoj al la Krucvortenigmo el «Cerbe kaj Kore» n-ro 21

Horizontale:

4. Sporta, vent- kaj pluv-imuna jako kun kapuĉo – ANORAKO
7. 1) Esenca kaj kerna ideo; 2) valoro, graveco – SIGNIFO
8. Hebrea tribunalo – SINEDRIO
10. Frakcio kun numeratoro egala al unu – ONO
11. Fabela estaĵo de malsupera rango, dotita per supernaturaj povoj – FEO
16. Speciala skribo, konsistanta el difinitaj aranĝoj de elstaraj punktoj – BRAJLO
17. Plenumo de ies volo aŭ ordono – OBEO
18. Ĉefurbo de regno en Afriko – LUANDO

Vertikale:

1. Akordo, formita de du voĉoj, aŭdigantaj samtempe unu saman tonon – UNISONO
2. Organizita taĉmento da laboristoj, kune laborantaj sub unu ĉefo – BRIGADO
3. 1) Rozosimila ses-koralulo; 2) kemia elemento – AKTINIO
5. Ludo inter du personoj – GOO
6. Virino, destinita profeti kaj ne esti kredata – KASANDRO
9. Flosanta ilo alfiksita ĉe la fundo – BUO
12. Proza verko, ĝenerale nelonga, libere esprimanta la pensojn de la aŭtoro – ESEO
13. Antikva kordinstrumento kun ses kordoj frotataj kaj sep ŝoveblaj fretoj – VJOLO
14. Ekstrakvalita kafo kaj/aŭ infuzaĵo el ĝi – MOKAO
15. Interna parto de ŝipo, destinita por ricevi la kargon – HOLDO

Anonco

Mi vendas raran kolekton de la ĵurnalo "Sovetia Esperantisto".

Ĝi estis eldonata en Baku en 1989-1990. Trilingva, multkolora, 4-paĝa ĵurnalo. Apude mi al kroĉas la frontpaĝojn de la unua kaj lasta numeroj. Prezo estas 5500 rubloj (kun sendokosto) por nepeterburganoj kaj 5000 rubloj por peterburganoj.

Anatolo Sidorov. Mia E-mail estas: anasido@gmail.com





Humuro

Amuzaj notoj el la gastlibro de Ermitejo

- 1) Observante ĉion, la elektrajn kablojn ĉe vi instalis flandraj majstroj de la 17 jarcento.
- 2) Kie en la ekspoziciejoj estas rubujoj? La semŝelojn ni zorgeme kraĉadis al la manplato de Herkulo.
- 3) Deĵorantino en la halo de porcelanaĵoj mem similas porcelanan pupon.
- 4) La voluptema supernutrita korpo de Danaa ĝis nun ne estas kovrita!
- 5) Jam tempas forigi deĵorantinon el la halo de antikva arto, kiu mortis pasintjare dum mia unua vizito de via arta templo.
- 6) Oni scivolas kompreni, kio estas flandraj pentristoj? Mi kontrolis la mapon, forestas la lando Flandrio!
- 7) La ĉiĉeronino Palkina batas kontraŭ brakoj per unu metron longa montrilo. Ekzistas vundoj, ostropiĝoj.
- 8) Mi trairis ĉiujn halojn kaj laborĉambrojn de Ermitejo, sed la direktoron tute ne trovis! Ĉu li ĝenerale laboras au nur salajron ricevas?
- 9) Al ni ne plaĉis Lenin-busto en la halo de antikvaĵoj. Absolute ne similas! Ĉu oni tie Lenin-on ne vidis? (Veteranoj de loĝeja kooperativo numero 5).
- 10) Kiu idioto konsilis al vi prilabori vian luksan pargeton per soldata kazerna vakso?
- 11) Viaj vitraj sekurŝirmiloj ĉirkaŭ la eksponaĵoj tedis!
- 12) "Lasta tago de Epopeo"! Tio estas perfektaĵo!
- 13) Mi estas malagrabla surprizita, ke en la muzeo de porcelano ne estas prezentitaj varoj de nia Bogdanoviĉa porcelana fabriko. La administrantoj de Ermitejo kvazaŭ hazarde reklamas nur eksterlandajn produktantojn!
- 14) Ĉeesto de deĵorantonoj pli aĝaj ol 60 jaroj tre seniluzigis la tutan ŝipanaron de nia submarŝipo. Ni ja tutan duonjaron revis pri tiu ekskurso...
- 15) Ĝis nun mirigas nin necesejoj de Ermitejo! Kiudiable rusa imperiestro bezonis kvardek ses necesabojn kaj dudek tri pisujojn?

Tradukis Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburgo)

CERBE kaj KORE

n-ro 22 (90), novembro 2021

Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 122

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio

Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de ĝusta indiko de la fonto

CKK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru.

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 11.11.2021